

## El la Butonmilito: la milit-deklaro

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 553/87-2, 1982 januaro 28 kaj 30.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1982-87/SRI-1982-87-2-553-Claude-kaj-Andree-GACOND-El-la-la-Butonmilito-la-milit-deklaro.mp3>

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Literature la jaro 1982 estas inetralie markata de la jubileo Louis Pergaud. La plej konata romano de tiu franclingva verkisto estas la BUTONMILITO. Ni anoncis, ke Kultura Centro Esperantista estas eldonanta tiun ĉi romanon dank' al esperantigo de Roger Bernard.

A.- Jen, el tiu esperantigo ni laŭtlegas al vi hodiaŭ, kiel deklariĝis la BUTONMILITO.

Cl.- Kiam sonis la dekunua ĉe la malnova paroĥa sonorilturo, la lernantoj senpacience atendis la signalon de 1' foriro, ĉar ĉiuj jam informiĝis, oni ne scias kiel: enfiltrado, disradiado aŭ alimaniere, ke Lebrac ion eltrovus.

A.- Kiel kutime okazis kelkaj kunpuŝiĝoj en la koridoro, interŝanĝoj de beretoj, ĉapoj, perdo de lignoŝuoj, insidaj pugnobatoj, sed la instruista interveno ĉion reordigis, kaj la elirado okazis tamen normale.

Cl.- Tuj kiam la instruisto reiris, ĉiuj kamaradoj impetis al Lebrac kvazaŭ paserbando al freŝa ĉevalsterko.

A.- Tie troviĝis, krom la ordinaraj soldatoj, kaj la malpli grava taĉmento-resto, la dek ĉefaj militistoj el Longeverne avidantaj satiĝi el la paroloj de la estro.

Cl.- Lebrac elmetis sian planon, simplan sed aŭdacan, poste li demandis, kiuj estos "la tiuj" kiuj lin akompanos ĉi-vespere.

A.- Tiun honoran ĉiuj postulis, sed kvar sufiĉis, kaj estis decidite, ke Camus, La Crique, Tintin kaj Grangibus partoprenos la ekspedicion: Gambette, loĝante sur la Deklivo, ne rajtis tiel longe foresti, Guignard malbone kapablis vidi nokte, kaj Boulot ne estis rapidgesta kiel la aliaj.

Cl.- Oni tiam disiĝis.

A.- Vespere, ĉe la Anĝelussonorado, la kvin soldatoj rekuniĝis.

Cl.- Ĉu vi tenas kreton? demandis Lebrac ĉe La Crique, kiu pro sia loko apud la nigra tabulo prenis sur sin ŝteli du pecojn el la skatolo de oĉjo Simon.

A.- La Crique majstre sukcesis: li elprenis kvin pecojn, longajn; li konservis unu por si, kaj donis po unu al ĉiu batalfrato. Tiel, se unu survoje perdis sian pecon, la aliaj povus facile tion kompensi.

Cl.- Hejoj! nun ni ek! diris Camus.

A.- Tra la ĉefvojo de 1' vilaĝo unue, poste tra la pado de Cheminée, kiu kunligas al la granda Tilio la vojon al Velrans, estiĝis en la nokto sonora lignoŝuado. La kvin knaboj rapidege iradis rekte al la malamiko.

Cl.- Necesas apenaŭ duonhora piede, diris Lebrac, ni do povas tien aliri en kvaronhora, kaj ni revenos ja nete antaŭ la fino de 1' vesperkunvenoj.

A.- La galopantoj silente malaperis en la mallumon; dum duono de la irado la roteto ne forlasis la ŝtonitan vojjon, kie eblis marŝi, sed tuj kiam ili suriris la malamikan terenon, la kvin konspirantoj trotetis sur la flankaj talusoj, kiujn oĉjo Breda, la vojriparisto, flegis, laŭ la klaĉoj "ĉiufoje kiam defalis unu lia okulo". Kiam ili estis tute apud Velrans kaj la lumoj iĝis pli netaj malantaŭ la vitroj, kaj la bojadoj de la hundoj pli minacaj, ili haltis.

Cl.- Ni demetu la lignoŝuojn, konsilis Lebrac, kaj ilin kaŝu malantaŭ tiun muron.

A.- La kvar militistoj kaj ilia ĉefo formetis la lignoŝuojn kaj en ilin ŝovis la ŝtrumpojn; poste ili kontrolis, ĉu ili ne perdis la kretpecon, kaj, unu post la alia malantaŭ la ĉefo, kun larĝe malfermita pupilo, streĉita orelo, vibra nazo, ili alpaŝis la milit-padon por atingi kiel eble plej rekte la preĝejon de 1' malamika vilaĝo, celon de ilia nokta entrepreno.

Cl.- Atente je la plej eta bruo, platiĝante funde de la fosaĵoj, streĉiĝante al la muroj aŭ malaperante en la mallumajn heĝojn, ili glite iradis, antaŭeniĝante kvazaŭ ombroj, timante nur la subitan ekaperon de lanterno portata de vilaĝano iranta al vesperkunveno, aŭ la ĉeeston de malfruiĝinta vojaĝinto kondukanta sian ĉevalon al trogo. Sed nenio ĝenis ilin, krom la bojado de 1' hundo de Jean des Gués, idiota hundo kiu senĉese blekadis.

A.- Fine ili alvenis al la placo de 1' preĝejo kaj iris ĝis sub la sonorilojn.

Cl.- Ĉio ĉirkaŭe estis senhoma kaj silenta.

A.- La estro restis sola, dum la kvar aliaj revenis iom malantaŭen por gvati.

Cl.- Tiam, prenante el sia poŝo la kretpecon, stare sur siaj piedfingroj kiel eble plej alte, Lebrac skribis sur la masivan panelon el polvo-nigriĝinta kverkoligno de la sankta loko jenan frapan formulon, kiu estigos skandalon, morgaŭ je la horo de la di-servo, ja pli multe pro sia heroa kaj provoka krudeco ol pro sia fantazia ortografio:

Ĉiuj la Velransaj estas merdviŝuloj!

A.- Kaj kiam li, kiel li diris, algluis la okulojn al la ligno por konstati, "ĉu ĝi bone markis", li revenis al la kvar komplicoj, kaj mallaŭte kaj ĝoje diris :

Cl.- Nun for!

A.- Sentime nun, ili unulinie paŝadis meze de la vojo, kaj reiris senbrue al tiu loko, kie ili delasis ŝtrumpojn kaj lignoŝuojn.

Cl.- Sed tuj kiam reŝuitaj, senatente al nun senutilaj singadoj, frapante sonore la grundon, ili reatingis Longeverne kaj sian propran loĝejon, atendante plenfide la efekton de sia militdeklaro.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond laŭtleĝis parton de la unua ĉapitro de la romano LA BUTONMILITO, kiun Kultura Centro Esperantista estas nun eldonanta. Venontsemajne ni legos al vi alian scenon el tiu ĉi baldaŭ aĉetebla pri-infana romano. Ĝis reaŭdo!